

& La vulpo kaj la korvo:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<:31> (/mi mi dolre mi mi mido re fa; mimimi mimi mido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Flatate, gardu vian saĝon. ; La korvo ŝtelis for fromaĝon

(×: **En la ĉen'** ; **Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen'** ; **Dancu nun trankvile.**)

'2 de ie, kaj por ties manĝo ; sidiĝis sur tre alta branĉo.

'3 La vulpo, kiu tre malsatis, ; rigardis ĝin kaj jene flatis:

'4 "Ho korvo! Viaj plumoj brilaj! ; Kie troviĝas do similaj?

'5 Kaj la vizaĝo, la staturó! ; Vin vidi estas ja plezuro!

'6 Se via voĉo estas klara, ; vi vere estas senkompara!"

'7 La korvo, por akiri plaĉon ; per sia voĉo, grakis vante,

'8 de l' bek' faligis la fromaĝon, ; la vulp' ĝin portis for kurante